

# MIA UNUA VOJAĜO OKCIDENTEN

Jarmila Rýznarová – *Ĉehio*

Ĉe UEA-kongresoj de esperantistoj, kiujn oni aranĝas ĉiujare en alia lando, okazas ankaŭ konkursoj de belartoj. Antaŭ jaroj ekzistis fotografado inter poezio, prozo, teatraĵo aŭ kantoj. Tiun ĉi branĉon mi ankaŭ partoprenis en la jaro 1964. Temo de la fotokonkurso estis frazo el la libro Taglibro de Anna Frank: "ĉu mi tiel freneze amas la naturon, ke pro tio mi tiel longe ne povas elpuŝi mian nazon eksteren?"




Jarmila, aktiva kunlaborantino de Almanako Lorenz.

Por la konkurso mi sendis foton – sunsubiron inter nuboj post pikdratoj.

Mi gajnis unu el la ĉefaj premioj: 150 guldenojn. Kiam mi demandis en nia ŝtata banko, kiom da ĉeĥoslovakaj kronoj mi povas ricevi por tiu sumo, ili diris al mi, ke 300 Kčs. Tia respondo min kompreneble ne kontentigis. Helpe de konataj esperantistoj ni interligis nin kun nederlanda familio el Rotterdam, kaj ili skribis al mi: „Vi povas alveturi al ni kun Via edzo por 10 tagoj, 50 guldenojn ni prenos por Via restado inkluzive manĝo kaj por 100 gld

Vi traveturos kun ni trionon de Nederlando“. Hoj, ni estis feliĉaj. Poste ni kune tre ofte korespondis kaj pluan jaron ni preparis nin por la vojaĝo.

Ni ambaŭ ricevis po 5 dolarojn por 10 tagoj kaj niaj novaj geamikoj devis skribi deklaron, ke ili ĉion por ni pagos.

Kelkajn tagojn antaŭ nia forflugo venis al mi en mian okupon nekonata viro, montris sian identigilon kaj konsilis al mi, ke ni evitu emigrantojn kaj se dum nia vojaĝo aŭ en NL iu demandos pri nia armeo, aerodromo, kazerno aŭ soldatejo, ke ni ne respondu. Mi konsentis, ĉar mi entute je io simila ne pensis.

Mi ne volas ĉi tie skribi pri nia belega vojaĝo, pri plenplenaj nederlandaj vendejoj, kiuj en tiu tempo ĉe ni estis malplenaj, ja por ĉio ni devis stari en vicoj. Laŭ kutimo de mia junaĵo mi notis ĉiujn travivaĵojn en mia tagkajereto kaj kiam mi revenis en mian okupon, mia kajereto estis en mia mansaketo, ke mi povu dum tagmeza paŭzo rakonti al miaj kunlaborantoj pri belega vojaĝo.

Sed tuj matene aperis en mia oficejo fremda viro, montris identigilon de STB (sekreta polico) kaj diris, ke mi ricevis permeson de mia direktoro forveturi kun li. Do mi kunprenis mansaketon kaj kun granda timo kun li foriris. Antaŭ nia entrepreno li sidigis min en lian aŭtomobilon kaj ni haltis antaŭ „ministerio de timego“, kiel ni diradis al polica direktorejo. La lifto veturigis nin al la plej alta etaĝo, antaŭ pordo kun krado. Post sonorilo malfermis al ni pordisto kaj la viro gvidis min ĝis fino de longa koridoro. Li malŝlosis la ejon, ni eniris, li ŝlosis kaj la ŝlosilon metis en sian poŝon.

Ĉu vi povas imagi – ĉefe vi, virinoj – mian grandegan timon, kiam antaŭ la fenestro staris divano kaj mi en tiu tempo estis ankoraŭ juna kaj sufiĉe belaspekta? En tiu tempo ni aŭdis, kiel policistoj batis homon, kiu ne volis diri veron pri politiko kaj ankaŭ mia patro estis tutan tagon batita, ke li ne skribis en demandilon, ke lia bofrato fuĝis en okcidentan landon. Mia patro revenis kun du rompitaj dentoj.

Tiu ĉi viro komencis demandi min, kiel mi fartis en NL, sed mia gorĝo estis kuntiriĝinta, ke mi ne povis normale paroli. Hazarde mi rememoris je mia tagkajereto, mi pruntis ĝin al li kaj mi petis, ĉu mi unue povus manĝi mian bulkon,

ke mi hejme ne havis tempon por matenmanĝi. Ke li dume legu kaj mi poste respondos, kion li bezonos scii.

Do mi iomete trankviliĝis kaj poste respondis. Li kelkfoje min certigis, ke li ĉion scias, sed ĉion li volas aŭdi de mi. Mi respondis tre naive, ekzemple, ke mi tute ne komprenas, kial oni skribas pri loĝantoj post la „ferkurteno“, ke ni en nia respubliko ne havas sufiĉe da manĝo, eĉ ne belan vestaĵon, kaj poste vidis nin




Fotoj de Jarmila en sia tre bela ĝardeno.
Nekredeble! eĉ la hundino de Jarmila volas legi Almanakon Lorenz.

bone vestitaj, ke tio estas stranga politiko, kiu malbonigas nian nacion.

Kiam la sekretulo nenion gravan de mi eksciis, li proponis al mi pli bonan okupon, pli taŭgan labortempon kaj dufoje pli grandan salajron. Kiam mi demandis pri speco de laboro, malfacile mi restis trankvila. Sekrete mi malfermus leterojn de esperantistoj kaj legus al li, ĉu tie ne estas io malbone skribita kontraŭ nia respubliko. Kiam mi rifuzis, ke mi tre malfacile kutimiĝas je la nova etoso, li demandis, ĉu miaj kunlaborantoj ofte rakontas iajn politikajn anekdotojn.

Tiu homo vizitis min en mia okupo ankoraŭ dufoje, sed li ne sukcesis min konvinki por kunlaboro.